# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo** **februaro 2026**

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

Madrida Esperanto-Liceo (MEL) okazigos sian ĝeneralan kunvenon en tiu ĉi monato. Jen la kunvoko, kiun aparte ricevis ĉiuj anoj kun la koncernaj dokumentoj:

La prezidanto alvokas ĉiujn membrojn de Madrida Esperanto-Liceo por la ordinara ĝenerala asembleo okazonta la lundon 2-an de februaro 2026 je la 18:00 (unua alvoko) kaj je la 18:30 (dua alvoko) en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro 13-3-7 de Madrido.

Oni pritraktos la sekvajn aferojn:

1.- Raporto pri evoluo de la membraro

2.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2025

3.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-raporto 2025

4.- Decido pri la jarkotizoj 2027

5.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la propono por stipendioj 2026

6.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2026

7.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-programo por 2026

8.- Renovigo de la estraro

9.- Demandoj, petoj, proponoj

10.- Redaktado, laŭtlego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

Se vi deziras partopreni rete, bv. sciigu tion al ni por ke ni donu la ligilon. Se vi ne povos ĉeesti, nek persone nek rete, memoru ke vi povas transdoni vian voĉdon-rajton al alia ĉeestonta kunsentanta membro, pere de mesaĝo al: madrid@esperanto.es.

GRAVA!: Atentu speciale ke ni devas renovigi la estraron, pensu ĉu vi volas esti kandidato por iu el la postenoj.

Se vi ne estas membro, por aliĝi al MEL sufiĉas ke vi plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple venu al la sidejo dum la kunveno. La kotizo estas nur 12€ jare.

Kaj se vi jam estas ano, ne forgesu pagi vian kotizon, ĉu en la sidejo ĉu en la konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero de konto: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

## PRELEGO EN BIBLIOTEKO

La 5-an de februaro Javier Vílchez, instruisto de la nuna sideja kurso, prelegos denove pri Esperanto. Tio okazos en la Biblioteko Iván de Vargas, en la strato San Justo (tre centre, proksime al la strato Mayor), je la 18 h.

Pliaj detaloj en la retejo de la madrida urbestraro, ĉe: https://mallonge.net/biblioivan. Bv diskonigi inter interesatoj.




## LIBERAJ EKZAMENOJ EN UNED

En januaro komenciĝis la aliĝperiodo de la "liberaj" ekzamenoj de Esperanto en UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia). Ĝis la 31-a de marto eblos aliĝi al la ekzamenoj de ĉiuj niveloj nun ekzistantaj, A2, B1 kaj B2, por ricevi la saman atestilon kiun studentoj akiras trapasinte la respondajn lingvokursojn de UNED post tuta lernojaro. La ekzamenoj okazos de majo ĝis junio. La aliĝo

al libera ekzameno kostas 80 eŭrojn kaj ne postulas hispanan civitanecon aŭ studentecon en alia ajn programo de UNED. Vidu detalojn ĉe: https://mallonge.net/UNEDlibre.

## NI PARTOPRENIS EN TELEVIDA KVIZO

Kiel ni informis en pasinta bulteno, Hispana Esperanto-Federacio ricevis inviton ĉeesti kaj partopreni televidan kvizon "El precio justo". Preskaŭ 20 homoj respondis la alvokon, kaj ni havis la ŝancon ĉeesti la registradon de tri programoj. En unu el ili ni aperas ofte kiel publiko, kaj krome partoprenis unu madrida esperantisto kiel konkursanto.




Ni ne malkovros la rezulton, do vi mem povos ĝin spekti en la venontaj tagoj; ni ne certas pri la dato, sed probable ĝi okazos fine de la dua semajno de februaro, tagmeze en la televidstacio Telecinco.

## EN LA RADIO

La 15-an de januaro Toño del Barrio kaj Elsa Martínez estis intervjuitaj en la tutlanda radiostacio COPE, en la programo "La tarde", dum sufiĉe longa tempo. La registradon kun teksta resumo (kun la iom misinterpretebla titolo "A los 3 meses yo ya era capaz de hablar esperanto") vi povas aŭskulti ĉe: https://mallonge.net/latardecope.

Jorge Camacho estis denove intervjuita pri sia dulingva poemaro "Gadir", en la programo pri la araba lingvo de Radio Exterior de España. Vi povas aŭskulti ĝin, ĉe: https://mallonge.net/reecamacho (min. 20, post la novaĵoj).

Ana Manero partoprenis en la programo "Olvida tu equipaje" en Radio Utopía, prezentante sian libron pri Maruja Mallo. Vi povas aŭskulti ŝian interparoladon, kun la partopreno ankaŭ de Miguel Fernández, en la ligilo: https://mallonge.net/OTEmaruja.

## RETA RENKONTO KUN GIAN CARLO FIGHIERA

La Veterana Esperantista Klubo organizas renkontojn retajn kun veteranaj esperantistoj. La 5-an de januaro la invitito estis Gian Carlo Fighiera, esperantisto ekde la jaro 1947 (!), unu el la motoroj de Madrida Esperanto-Liceo en la fruaj 80aj jaroj, kune kun sia edzino Ada. Gian Carlo verve rakontis siajn spertojn, ankaŭ tiujn en Madrido.

## NOVA SCIENCA KALENDARO

La Scienca Kalendaro de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC) denove havas esperantan version en la jaro 2026. Memoru ke temas pri kalendaro kiu ĉiun tagon de la jaro memorigas eventon aŭ sciencIston, kun aparta atento al diverseco. Vi povas ĝin trovi, kun aliaj dosieroj, en la retadreso https://digital.csic.es/handle/10261/411155, el kie vi povos elŝuti belan pdf-forman dosieron.




HEF presigis kelkajn kalendarojn. Ili kostas 6 €. Se iu leganto deziras havi ekzempleron, bv kontakti kun la sidejo.

**nia voĉo** **februaro 2026**

## VIZITIS KAJ VIZITOS NIN

En la januara unuasabata kunveno en trinkejo de la strato Idioma Esperanto akompanis nin Ĵotaro Takada, samideano el Japanio, nun studanta en Salamanko.



Meze kaj fine de januaro, en du apartaj vojaĝoj, vizitis la sidejon du amikoj el Brazilo. La 19-an vizitis nin Elton Castro, kaj la 26-an Ikvero Almeida Silva, vicprezidanto de TEJO.

La dimanĉon 22an de februaro je la 11a matene, samideano Fráncel prelegos pri Yumeiho-terapio. Li kaj lia edzino venas el Ekvadoro, originas el Kubo kaj turismos tra Eŭropo.

Meze de aprilo venos al Madrido kun sia edzo Mariko Aoshima, de Hamburgo, Germanio (origine el Japanio). Ŝi loĝis en Madrido en 1985 kaj vizitis la sidejon en Atocha.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sen aparta programo.

La sabata kunveno okazos la 7-an de februaro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Vi povas trovi nin ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com